Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 2-a de Decembro 2019

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Dror Gaon, Gabi Zeevi. Gastoj: Lea Kudevitzky, Amos Ŝapira.

Protokolo de la pasinta kunsido estas en la retejo
https://www.esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201911.pdf

Raportoj:

a) Eran kaj Amri gvidis E-grupojn kadre de projekto "Nicocot".
b) ELI ricevis atestilon pri propra administrado (אישור ניהול תקין) por 2020.
La Estraro esprimas sian dankon kaj estimon al nia kasisto, Ŝlomo, pro lia senlaca laboro, kiu ebligis tiun deziratan aprobon!
c) Problemoj de la poŝto kun nia poŝtkesto / adreso (Jehoŝua)
d) Jehoŝua: mi k. aliaj - ne ricevas la paperan revuon E-o dum la tuta jaro!
e) Jehoŝua: Magazeno en Yad2: inter 8-28 m^2, luo kostas de 650 ĝis 2300 NIS

1. Zamenhofa Vespero / Ĝenerala Kunveno (ĜK) Amri k.a.

a) Nava Bilitzki konsentis prezidi la ĜK-n.
b) Aldonita detala programo de la ZV kaj ĜK, verkita de Amri konsulte kun Matilda, Jehoŝua kaj Ŝlomo.
c) Matilda pledas ke ĉiuj distraj eroj estu en la unua parto, ĉiuj formalaĵoj en la dua – por simpligi. *La Estraro akceptis kun malmultaj esceptoj*). Vigla diskuto pri la enhavo kaj formo de la ZV, por ke ĝi estu konvena kaj por novuloj kaj por veteranoj. Miksitaj eroj de distraĵo kaj administrado, ktp (Lea levis plurajn kritikojn, Amri, Jehoŝua kaj aliaj respondis).
ĉ) Por la balotoj Amri proponas:
1) Elekti la estraron por 2 jaroj (kiel en TEJO, ĉe UEA 3 jaroj) - *la Estraro akceptis.*
2) Limigi la oficon de la prezidanto al 6 sinsekvaj jaroj (kiel en UEA) - *la Estraro akceptis.*
d) Kandidato por prezidanto de ELI (laŭeble trovi ĝis la ĜK) – ne troviĝis memvolaj kandidatoj. Rekta elekto de la prezidanto (de la ĜK? – Jehoŝua kontraŭas.

2. Kurso (Amri)

a) Amri korespondis kun Eldad, Doron kaj Amir, cele al starto de la reklamado. Ne estis atingita interkonsento.
b) Eldad kaj Amir kontraŭas ripeti la anoncon en "Galeria" de Haarec, ĉar ĝi estas jam elĉerpita, kaj alportas ĉefe maljunajn personojn kiuj fine ne restas. Doron tamen favoras.
c) Amir kaj Eldad proponas kontrakti kun kompanio kiu faru profesian kampanjon en la Interreto (Facebook, Instagram…) por provi trafi pli junan publikon. Amir sendis proponon de kompanio, kiu petas 2000 NIS por monato por konstrui profesian retpaĝon kaj pagitajn FB-reklamojn. Propono: ĉi-jare (urĝe!) estu la "Galeria", venontjare ni turnos al kompanio jam en junio/julio, por ke la merkatigo komencu jam en septembro (ili bezonas 2 monatojn por ke la kampanjo plene efiku). *Voĉdono: unuanime akceptita!*

2/...

ĉ. Kotizo: pasintfoje interkonsentita 600 NIS, necesas decidi. Post diskuto (kelkaj proponas malaltigi, aliaj altigi) Jehoŝua proponis 700 siklojn. Pri ev.-aj rabatoj decidos Amir (studentoj, soldatoj, pensiuloj, infanoj). *Unuanime aprobita!*
d) Kiom estos la minimuma nombro de pagintoj, por malfermi la kurson (por povi pagi la salajron de Eldad)? Se la kotizo estos 700 NIS, la nombro devus esti 11 gelernantoj, kiuj kovros la pagon al la instruisto. Sub tiu nombro NE ekos la kurso. Se estos bezonata, ELI krompagos iomete, ekz. se estos rabatoj.
e) Ĉu inkludi aŭ ne inkludi la prezon de la kurso en la reklamoj? Propono: lasi al Amir decidi en tiu punkto. *Voĉdono: 4 pro, 1 kontraŭ, 1 sindetenas.*

3. IEK-21 (Amri)

a) Amri verkis detalan provizoran programon por la IK kaj la PK, inkl. kotizojn por eksterlandanoj. Dror jam enretigis: http://esperanto.org.il/ik.html
b) Nava informiĝis ĉe la gastejo pri la kotizoj por ĉiuj kombinaĵoj de personoj en la ĉambroj kaj por la vespermanĝo.
c) La baza kosto (3 noktoj + vespermanĝo en 2-lita ĉambro por persono): 1007 NIS.
ĉ) Por eksterlandanoj (inkl. programon, sen VAT, ekde 1.1.2020): 300 eŭro.
d) Aperis anonco en la decembra n-ro de Esperanto, 1/8 paĝo dorskovrile.
e) Zuzana ne venos, sed venos Dina Rubina, fama verkistino rusa/israela.
f) Ekskursa propono: vendrede – malnova Jafo, sabate (piede) - la rivero Jarkon kaj la haveno de Tel Aviv, dimanĉe – Jerusalemo (samptempe kongresa ekskurso kaj PK).

4. Dratverejo (Ŝlomo)

a) La luanto parolis kun Ŝlomo kaj Jehoŝua. Pro la minaco de evakuado li promesis ekpagi. Jam pagis al Amos 4000 siklojn por novembro, kaj ekde decembro promesis pagi 4500 siklojn je la 28-29 ĉiumonate.
b) Ŝlomo NE devas pagi NUN 5700 NIS por evakuado – sed se la loĝanto ne plenumos la promesojn, ni aktivigos la Ekzekucian Instancon. Ni tamen avizu la Ekzekucian Instancon ke ni haltigas, sed ne nuligas la procedon, por ne fermi la dosieron.

5. Israela E-isto (Mikaelo)

a) IE-168 estas preskaŭ fin-enpaĝigita. Restis la lastaj ev.-aj korektoj.
b) Amri presigos ĉe Yakirprint por disdoni dum la ZV kaj provi dissendi al la abonantoj. Amri kunportos kelkajn al Germanio.

La venonta kunsido: 13-a de Januaro 2020, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi